
# *Partoprenas Kubo en la 46-a sesio de la konsilantaro de homaj rajtoj*




**Bruno Rodriguez, ministro pri eksteraj rilatoj**

?enevo, feb 23 (RHK) La kuba ministro pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez, partoprenas hodia? en la 46-a sesio de la Konsilantaro de Homaj Rajtoj de UN, kie li denuncas la agresojn kontra? la kariba insulo.

En la dua tago de la segmento altnivela de la forumo, oni esperas la partoprenon de la insulo kaj ties sintenon pri la sekvoj de la Kovim-19 en la homaj rajtoj, surbaze de la internacia solidareco entreprenita de la kariba insulo fronte al la pandemio.

La malsano kaj ties sekvoj okupis la anta?an tagon, gravajn spacojn en la konsilantaro de UN, kiu sesias per videokonferencoj kun alvokoj kiel tiu farita de la ?enerala sekretario de UN, António Guterres, postulinte la universalan aliron al la vakcinoj kontra? la viruso Sars-Cov-2.

Kubo estas unu el la 47 membro?tatoj de la faka organo pri la temo de homaj rajtoj, kiu tradicie alvokas pri kunlaboro kaj rifuzas selektivecon, manipuladon kaj duoblajn mezurilojn pri tiom tikla afero.

Spite al la premoj kaj kampanoj de la administracio de la eksa prezidento usona Donald Trump, la insulo estis elektita pasintjare, por la kvina fojo, kiel membro de la Konsilantaro de Homaj Rajtoj, post ricevi subtenon de 88% de la membraro de la ?enerala asembleo de UN.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/248566-partoprenas-kubo-en-la-46-a-sesio-de-la-konsilantaro-de-homaj-rajtoj

**Radio Habana Cuba**